Jar-raporto pri ESF kaj E-USA

Esperantic Studies Foundation subtenas multajn Esperanto-agadojn. Tiu kiu rilatas al Esperanto-USA estas la subteno de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK). ESF komencis la subtenon en 1998 per la unua donaco de Cathy Schulze kaj post ŝia morto en 1999 per eĉ pli granda sumo. Dum la lastaj dek jaroj, ESF garantiis la daŭron de la mondkonata programo per ne nur gvido sed ankaŭ pago por la organizajn kostojn de NASK. La plej gravaj partoj de tio estas la pago de stipendiojn plus kromajn kostojn por la instruistoj, redaktoro de la NASKa Fasko, kaj administrado.

Ĉiu iris glate ĝis la aŭtuno de 2008 kiam la ekonomia situacio kaŭzis la perdon de ĉirkaŭ 40% de la valoro de la ESF investoj. Tio lasis al la estraro de ESF la elekton inter malgrandigi la kapitalon en la Schulze-Fondusa parto de la investo sub ĝia komenca nivelo aŭ malgrandigi la buĝeton por NASK. La fina decido estis la dua. Tiu signifis ke estus malpli da mono por stipendioj kaj aliaj kromaj kostoj.

Tiu decido okazis ĝustatempe kiam ni komencis la planojn festi la 40an datrevenon de NASK. Aldone, la ekonomio de la Ŝtato de Kalifornio ankaŭ suferis do unu solvo estis altigi la kostojn ĉe la universitatoj. Nature tiu tuŝis nian programon. Mi esprimis miajn zorgojn al longtempaj amikoj kaj E-USA ricevis donacojn al sia NASKE fonduso por iom helpi. La membro de SFERO eĉ promesis kurs-stipendion se mi bezonus ĝin.

Por helpi festi la 40an datrevenon de NASK, ESF starigos sian estraran kunsidon samloke kiel NASK sur la tereno de UCSD la semajnfinon de 10-12 julio. Tiel, la kursanoj havos okazon renkonti la gravulojn de la organizo, kaj la ESF estraro havos la okazon vidi kiel la programo funkcias ĉe sia nova hejmo.

Espereble, spite de la defioj de la lastaj monatoj, la financa situacio de ESF pliboniĝos kaj ni ne frontos la samajn problemojn en 2010.

Ellen M. Eddy